話筒

# Mikrofone

6-a jaro • Julio-Septembro, 2008

• Realiĝis la centjara sonĝo de la ĉina popolo

• Grava progreso de la ĉina spaciala tekniko




CRI 中国国际广播电台世界语部
Esperanto-redakcio de ĈRI

N.23





# Enkonduko

Realiĝis finfine la centjara sonĝo de la ĉinoj! La tuta mondo fiksis sian atenton al la ekscitaj tagoj de la Olimpiaj Ludoj, kiuj estis okazantaj en Pekino de la 8-a ĝis la 24-a de aŭgusto sub la ĉeftema slogano "Unu Mondo, Unu Sonĝo", ĝuis familianecon el la granda sporta soleno kaj dividis ĝojon kaj larmon kun la sportistoj el 204 membroj de la Internacia Olimpika Komitato dum tiuj neforgeseblaj 16 tagoj. En la Pekinaj Olimpikoj 132 olimpikaj rekordoj kaj 43 mondaj rekordoj estis renovigitaj kaj 87 delegacioj gajnis medalojn. Deklarante fermiĝon de la 29-aj Someraj Olimpikoj vespere de la 24-a de aŭgusto, s-ro Jacques Rogge, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, laŭdis, ke la Pekinaj Olimpikoj estas vere esceptaj.

Ankaŭ la Pekinaj Paralimpikoj tiris al si rigardon de la tuta terglobo. Tamen, anstataŭ zorgi la rezultojn de konkursoj, oni atentis pri la "Paralimpika Spirito". Philip Craven, prezidanto de la Internacia Paralimpika Komitato, laŭdis, ke la Pekinaj Paralimpikoj estas okulfrape sukcesaj. Li ankaŭ esprimis sian esperon, ke ĉiuj landoj prenu Ĉinion kiel ekzemplon en disvolvado de la handikapula afero.

La Pekinaj Olimpikoj kaj Paralimpikoj estis vaste raportataj. Amaskomunikiloj de diversaj landoj kaj regionoj sendis siajn raportistojn al Pekino. Ankaŭ nia redakcio sendis Wang Shanshan al la Paralimpikoj kiel specialan raportiston. Ŝi diligente laboris kaj donis la plej freŝajn raportojn pri la Paralimpikoj al niaj aŭskultantoj kaj legantoj de nia retejo. Antaŭ la Paralimpikoj ŝi faris al Renato Corsetti, eksa prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, telefonan intervjuon, kiun vi povas legi en tiu ĉi numero.

En la fino de septembro Ĉinio denove fariĝis fokuso de la mondo: Ĉinio lanĉis la homportan spacoŝipon Shenzhou n-ro 7 kaj sukcesigis la unuafojan spacopromenadon. Ni memoru la nomojn de la 3 heroaj kosmonaŭtoj Zhai Zhigang, Liu Boming kaj Jing Haipeng!

Agrablan legadon!

Amike salutas,

Jianping

## Resumo pri la "Konkurso de Scioj pri Pekinaj Olimpikoj"

Plensukcese finiĝis la Konkurso de Scioj pri Pekinaj Olimpikoj. Fine venis al ni sume preskaŭ 100 kontribuaĵoj el Belgio, Bulgario, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hindio, Italio, Japanio, Jordanio, Maroko, Rumanio, Rusio kaj aliaj sume preskaŭ 20 landoj. La kelkpaĝaj respondoj de la gajnintoj de la unua kaj la dua premioj estas tre detalaj kun koncernaj fotoj aŭ eseo kaj longa komento.

Post juĝado, Josef Kriz el Ĉeĥio gajnis la unuan premion. Ivan Budinov el Bulgario kaj Mitsunori Kawazoe el Japanio gajnis respektive la duan premion. Por instigi aktivecon de la partopreno, ĉi-foje ni pligrandigis la nombron de la gajnintoj de la tria premio. Post lotado, 7 el la partoprenintoj kun ĝustaj respondoj fariĝis feliĉuloj. Ili estas Livia Barth el Argentino, Jean Pierre Vanden Daele el Belgio, Daniel Dominicci Filho el Brazilo, Monika Dallmer el Germanio, Mourier Jean el Francio, Barkanyi Istvan el Hungario kaj Lagutenkov Igor el Rusio.

Varman gratulon al ĉiuj premiitoj kaj koran dankon al ĉiuj partoprenintoj! Ni esperas, ke ĉiuj aŭskultantoj fervore partoprenos en la nun okazantaj fotokonkurso de nia Redakcio kaj la Konkurso de turismaj scioj "Ĉarma Guangxi" de nia Radio.

Anticipan dankon kaj bonan sukceson al vi!

# Realiĝis la centjara sonĝo de la ĉina popolo




La 29-aj Someraj Olimpikoj oficiale malfermiĝis je la 20-a horo de la 8-a de aŭgusto en Birdnesto de Pekino. Al la solenaĵo ĉeestis Delegacioj de ĉiuj 204 membroj de la olimpika familio kaj pli ol 80 ŝtatestroj kaj registaraj ĉefoj, inkluzive de usona prezidento George W. Bush, japana ĉefministro Fukuda Yasuo kaj franca prezidento Nicolas Sarkozy kaj aliaj.

En la inaŭguro, oni ludis prezentadon titolitan "Belaj Olimpikoj". La bunta prezentado kaj la brilaj okulfrapaj artfajraĵoj servis kiel kultura kaj vida bankedo kun animskua efekto al la tutmondaj spektantoj, tio ne disigeblas disde aplikado de altaj kaj novaj teknikoj. La inaŭguron ĝuis per televidilo kaj interreto sume 4 miliardoj da spektantoj de la tuta terglobo. Pro aplikado de multege da altaj kaj novaj teknikoj en la inaŭguro aperis impona sceno ravanta la spektantojn kaj manifestiĝis la koncepto pri "altteknikaj olimpikoj" konsekvence porpledataj de la Pekinaj Olimpikoj.

La solena inaŭguro allogis la tutan mondon kaj donis grandan ĝuon al diverslandaj spektantoj. Post la inaŭguro, alilandaj gvidantoj, kiuj ĉeestis al la inaŭguro, sinsekve esprimis, ke Ĉinio elstare preparis por la olimpikoj kaj la inaŭguro estis ege brila. Ili opiniis, ke la solena kaj spektakla inaŭguro refoje montris, ke Ĉinio estas la nacio plena de penso, kreiva kapablo kaj senlima povo. Ankaŭ transmaraj amaskomunikiloj sinsekve laŭdis, ke la inaŭguro de la Pekinaj Olimpikoj, kiu estas "renkontiĝo de tradicio kaj civilizacio", estas tiel brila kaj imagriĉa, ke la tuta mondo dronis en admirego.

Vespere de la 24-a de aŭgusto, sukcese fermiĝis la 29-aj Olimpikoj en Pekino. Dum la 16 neforgeseblaj tagoj, diverslandaj sportistoj per obstina spirito strebis por elstare montri sin kaj prezenti al la tutmonda spektantaro diversajn intensajn konkursojn kaj matĉojn. Fine Ĉinio okupas la unuan lokon, Usono la duan kaj Britio la trian laŭ la nombro de oraj medaloj. Ĉinaj sportistoj kreis plej bonan atingon en la historio de Olimpikoj, faris historian trarompon kaj skribis novan ĉapitron de disvolvo de la ĉina sporta afero. La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina Ŝtata Konsilantaro letere sendis gratulon.

Prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato s-ro Jacques Rogge diris, ke la Internacia Olimpika Komitato estas tre kontenta pri la organiza laboro. Ciselle Davies, proparolanto de la Internacia Olimpika Komitato, diris: "Pekino bonege plenumis siajn promesojn. Ni vidis belegajn stadionojn kaj spektis altnivelajn konkursojn. Ni vidis ankaŭ, ke pli ol 20 000 registritaj raportistoj estas bone akceptataj. La Internacia Olimpika Komitato scias klopodadon de Ĉinio dum preparo por la 29-aj Olimpikoj kaj esprimas kontenton pri la laboro de Ĉinio."







Multaj eksterlandaj ŝtatestroj letere gratulis Ĉinion pro sukcesa okazigo de la Pekinaj Olimpikoj. Eksterlandaj amaskomunikiloj de Aŭstralio, Britio, Francio, Ĉeĥio, Irano, Malto, Nov-Zelando, Rumanio, Usono kaj aliaj landoj respektive grandskale raportis la Olimpikojn kaj aprobis, ke estas perfekta la organiza laboro de la Pekinaj Olimpikoj.

Laŭ statistiko, ĉi-fojaj olimpikoj estas senprecedencaj en la historio de Olimpikoj ĉu laŭ la nombro de aliĝintaj landoj kaj regionoj, ĉu laŭ la nombro de rompitaj mondaj rekordoj kaj aliaj flankoj. Al la fermo ĉeestis prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato Jacques Rogge, ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao kaj honorindaj gastoj el pli ol 20 landoj. En la fermo, Londono, la gastiganta urbo de la venontaj olimpikoj, transprenis la olimpikan flagon.

Ĉinio vere komplete plenumis siajn promesojn faritajn dum peticio de gastigo de la 29-aj Olimpikoj – okazigi "Verdajn, Humanecajn kaj Altteknikajn Olimpikojn kun apartaj trajtoj ". Ni povas diri, ke por liveri bonan ekologian medio kaj garantii la Olimpikojn sukcesaj, Ĉinio alprenis serion da pozitivaj kaj fruktodonaj rimedoj en mediprotektado, kuracado, manĝaĵa sekureco kaj aliaj flankoj. Kiel ekzemple oni rigore praktikis kontrolan sistemon pri manĝaĵa sekureco por garantio al la sano de la partoprenantoj. En aŭgusto la aerkvalito de Pekino atingis la plej altan nivelon en la pasintaj 10 jaroj kaj tiel Ĉinio plenumis sian promeson pri bona aerkvalito dum la Olimpikoj. Prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato Jacques Rogge donis altan takson kaj laŭdon al perfekta organiza laboro de Ĉinio. Intervjuate de raportisto, dumviva honora prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato Antonio Samaranch esprimis, ke la Pekinaj Olimpikoj gajnis grandan sukceson. La ĉina popolo kreis grandiozan historion. Li gratulis sukceson de la Pekinaj Olimpikoj.

Dum la Olimpikoj, Ĉinio akceptis pli ol 10 000 sportistojn kaj trejnistojn kaj pli ol 30 000 eksterlandajn raportistojn, kiuj venis al Ĉinio por fari intervjuon kaj raportadon. Okaze de la Olimpikoj estis en Ĉinio ankaŭ 100 000 da diverslandaj vojaĝantoj. Ili propraokule vidis veran Ĉinion, nekredeble plenan de memfido kaj amikeco. Estis la unua fojo por Ĉinio, ke en Pekino koncentriĝis tiel multaj fremdlandanoj dum certa periodo. Unu vido pli taŭgas ol cent aŭdoj, ĉie en la konkursejoj kaj sur stratoj de Pekino, ili renkontis diversformajn bonvenigojn de la entuziasmaj kaj gastamaj ĉinoj. Pekino ne nur alportas al ili mirindajn Olimpikojn, sed ankaŭ montris al ili veran Ĉinion. Vera Ĉinio emociis la tutan mondon.

Kvankam la olimpika torĉo jam estas estingita, tamen ĝi ĉiam restos en la koroj de ĉinoj kaj diverslandaj popoloj en la mondo.







# Pozitivaj eĥoj de E-organizoj kaj aŭskultantoj




Dum la Pekinaj Olimpikoj ankaŭ multaj landaj E-asocioj kaj diversalandaj aŭskultantoj sendis sinsekve gratulmesaĝojn kun bondeziroj kaj komentoj.

Prezidanto de Argentina E-Ligo skribis en la gratulmesaĝo: "Nome de Argentina Esperanto-Ligo, mi sendas miajn plej karajn gratulojn speciale al la organizantoj de la 29-aj Olimpikoj. Tutmonde oni vidas la profesian sintenon pri ĉiu agado tie farita. La ĉina estraro alportis ĉion bezonatan favore de tia atingo. Nia argentina esperantistaro kore dankas al Ĉinio pri tia mirinda



tutmonda donaco."

Eksprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio Augusto Casquero skribis: "Nun, granda parto de la mondo laboras, sidas, dormas apud la televidaparato. Kial? Ĉiuj deziras rigardi la Olimpiajn Ludojn en Pekino. Ankaŭ mi. Do, ofte mi ellitiĝas je la 03.00 horo por rigardi ties interesajn konkursojn.

"Ekde la unua tago, kiam okazis la Inaŭgura Ceremonio, mi restis ravita. Ĉinio bonege, mirinde, organizis ĝin. La ceremonio mirigis la tutan mondon. Bela, originala, eleganta, surpriziga. Miksante historion kaj tradiciojn kun la plej modernaj teknikaĵoj.

"Ĉi tiuj ludoj ne estas nur iu sporta afero. Temas pri amikeco inter la homoj, la popoloj. Eĉ utilas por pligrandigi la kulturan nivelon de ĉiuj, konante pri landoj, lingvoj, homoj el foraj mondpartoj. Kaj certe utilos por pligrandigi amikecon internacian. Por malfermi la menson al aliaj kulturoj. Ankaŭ Ĉinio kaj ĉinoj de tio multon lernos."

En la Informilo de Kultura Asocio Esperantista, Hispanio, oni aperigis informon pri Ĉinio skribinte: "La jaro 2008 estas rimarkinda por tiu granda lando sendube. La Pekinaj Olimpikoj aloportis tiun specialajn momentojn de lumo kaj buntaj koloroj, al kiuj nia geesperantistaro jam estas iomete alkutimiĝitaj pere de la nuna luksa Mikrofone, la unua eldonaĵo de Ĉina Radio Internacia. "Sed pri la Pekinaj Olimpikoj, vekis nian atenton unu rekordoj, tute neligita kun la sportaj ludoj. Ni mencias ĉi tie, la 50 milionojn da rozoj, ke la ĉinaj organizantoj dediĉis al la ornamo de Pekino en tiuj tagoj. Vera olimpika rekordo, malfacile atingebla en alia parto el la mondo!"

Argentina Livia Barth, azerbajĝana Davudov Magomed kaj multaj aliaj speciale sendis al ni gratulojn, salutojn kaj bondezirojn al Pekinaj Olimpikoj antaŭ la inaŭguro.

Pri impresoj de la Pekinaj Olimpikoj Kornelia Nagy el Hungario tiel skribis en sia letero:

Taŭgajn kaj trafajn vortojn
mi vane serĉis kun pasi',
ĉar ĝis nun ili tute ne ekzistas:
56 naciecoj en kostumoj,
tio estas kulturo, eĉ pli histori'.
Grandnombrega fanfar',
mirego de vizitantar'!
La belegaj voĉo kaj son'
de l' Olimpika Himno
por la animo, kor' kaj bon',
jam pli ol harmonie!
La "laboro" de tamburistoj --
arto por la okuloj,
surpriz' kaj mir' senprecedentaj,
dank' al famaj fakuloj.
Jen belulinoj en robetoj splendaj,
kvazaŭ avataraj feinoj.
Ho, kiaj mirakloj de ĉinoj!
Ĉio dum l' Olimpikoj;
nin al "la seĝo ligis"

ĉion, kion ni spektis ĝue,

al la Ĉiel' altigis...

Pollanda samideanino Urszula Makrzycka skribis en sia letero:"La jaro 2008 estas grava ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por ĉiuj sur la tuta terglobo. La Pekinaj Olimpikoj estas grava okazaĵo, kiu allogas al Ĉinio milojn kaj dekmilojn da sportistoj, raportistoj, turistoj kaj aliaj. Mi admiras vian landon por la gigantaj laboroj por gastigo de la Olimpikoj. Mi kredas, ke la granda tertremo ne ĝenos la ritmon de la prepara laboro kaj ne kaŭzos influojn al la Olimpikoj. Mi deziras al vi plenan sukceson!"

Bulgara amiko Angel Ivanov Maglov skribis en sia letero: "Nun la tuta mondo atendas la Pekinajn Olimpikojn. Tio estas grandega festo por amikeco inter la popoloj de la tuta mondo. Mi estas feliĉa, ke mi havis la ŝancon legi artikolon en Germanio pri la granda konstruaĵo 'Birdnesto' ".

Pollanda aŭskultanto Valdemar Gasior skribis en sia letero: "Mi esperas, ke sportistoj polaj kaj ĉinaj gajnos multe da oraj medaloj. Oni kalkulas ne nur nombron de ormedaloj, sed ankaŭ bonan sanan sportan atmosferon."

Alain Chalm el Francio skribis en sia letero: "Mi rigardis la malfermon de la Olimpikoj kaj deziras konigi al vi mian admiron pro la eksterordinara grandiozeco.




Mi komprenis, kial oni bezonis tiel multe da aktoroj. La sinkronizoj de diversaj movoj estis perfektaj kaj la plej mirindaj okazaĵoj estis kiam la amaso da intervenantoj moviĝis en la stadio desegnante kurbojn, ili ĉiam bone lokiĝis sen iu ajn eraro. Mi ankaŭ admiras la paciencon de la junaj volontuloj, kiuj dum la tuta parado dancante bonvenigis la sportistojn de 204 landoj kaj regionoj. La mirinda granda Birdnesto restos la plej memorenda en la olimpika historio. Alia mirindaĵo estas kiel mastri ĉion kun pli ol 90 000 aktoroj kaj spektantoj en la stadiono, ĉar oni devas aranĝi manĝaĵojn, loĝejojn, enirigi kaj elirigi ilin senprobleme. Sed ĉio estas zorgeme pripensita.

"Mi esperas, ke via moto 'Unu mondo, Unu sonĝo' iĝos al realeco! Ĉar tio estos grava laboro por la homaro kaj restas multe da farendaj laboroj. Mi dankas al la ĉina popolo, kiu okazigis tiel belajn Olimpikojn. "

Joop van Der Hoeven el Nederlando skribis: "La oka de la oka! Fine ja venis al magia dato! En nia lando multaj geedziĝontoj atendis tiun daton, por ke la edziĝfesto koincidu kun la pekina festego. Jes, festego! La impreso estis grandioza. La miraklo de Pekino estis, ke la imponeco tute ne erodis la korvarmigan etoson de ĝojo kaj gajeco; kontraŭe, ekestis belega harmonio. Grandaj kaj ankaŭ malgrandaj nacioj egale, fiere kaj abunde enmarŝis kun siaj flagoj en la tutmondan familian rondon sub varma kaj ĉarma bonvenigo de la ĉinoj! Ilia feliĉo estis videbla kaj sentebla!

" 'Unu mondo, Unu sonĝo' fariĝis, dum la solena gaja ceremonio de la malfermo, realaĵo! Neniam antaŭe mi vidis ion tian, kia povis entuziasmigi la koron. Okuloj kaj oreloj plenpleniĝis ĝissate. Honoron al Ĉinio! "


Rilate al rimarkoj pri la Pekinaj Olimpikoj, Molnár László el Hungario skribis multe kaj ĉi tie ni citis nur kelkajn paragrafojn: "Ekde la komenco de la Pekinaj





Someraj Olimpikoj, helpe de amaskomunikiloj oni povis informiĝi pri la plej grandaj sporteventoj ĵus okazintaj en Ĉinio kaj spekti - inter aliaj - la mirindajn konstruaĵojn de la ŝtata stadiono Birdnesto kaj la Akva Kubo.

"Je la unua rigardo oni povis konstati ankaŭ tion, ke la specialistoj-fakuloj uzis, aplikis la plej modernan teknologion, la supre menciitaj sportejoj tuj fariĝis plej verŝajne la plej monde konataj konstruaĵoj de nia 21-a jarcento. Per miaj okuloj mi vidis, ke sen iu ajn troigo mi povas diri, ke la nunaj Olimpikoj estas la plej imponaj, grandiozaj en la historio de la Olimpiaj Ludoj.







"Esti civitano de Ĉinio precipe nuntempe, pli precize dum la kurantaj Olimpiaj Ludoj, sentante la respekton de la diversnaciaj popoloj de nia Tero, admire parolantaj pri la kurantaj Olimpikoj, ĝis nun la plej grandskala kaj teknologie la plej altnivela, laŭ mi estas ne nur bonŝanco, donaco, sed ankaŭ la rezulto de la profunde pripensita, projektita, streĉita laboro. Via lando kaj ĉiuj kunlaborantoj ne nur meritas la respekton, sed estu fieraj pri viaj ekzemplodonaj sukcesoj, rezultoj!"

S-ro Jiri Patera el Ĉeĥio skribis en la letero: "Envere kun granda ĝojo kaj ĝuo mi spektis en la televido la solenan inaŭguron de la 29-aj Olimpikoj en Pekino kaj daŭrigas plu rigardi kun admiro la trapason de la Olimpikoj. La tuta kvarhora solenaĵo estis superba. Mi gratulas al vi kaj al la tuta Ĉinio! Estas admirinde, ke la inaŭguro okazis en Pekino vespere, por ke ni eŭropanoj povu rigardi la programon posttagmeze kaj amerikanoj eble matene. Do, duoblan gratulon al vi. Do bonan prosperon al la Olimpikoj, al ĉiuj sportistoj de la mondo kaj al la granda ĉina popolo!"

Alia ĉeĥa aŭskultanto Jindřich Tomíšek diris: "Mi tre volonte aŭskultas viajn E-elsendojn laŭ eblo, lastatempe detale informantajn pri la Pekinaj Olimpikoj. Mi tre interesiĝas pri ili kaj gratulas al bona organizo kaj tre sukcesa aranĝo, dum kiu oni ne nur admiras sukcesojn de la ĉinaj sportistoj, sed ankaŭ multe informiĝas pri Ĉinio kaj sukcesoj de la ĉina popolo! Mi deziras al tiu ĉi tre grava aranĝo plenan sukceson!"

S-ro Ru Bossong el Nederlando esprimis en la komento: "Ĉi-posttagmeze (NL-tempo) ni per televido vidis la grandiozan spektaklon pri la malfermo de la Olimpikoj. Ni gratulas la ĉinan popolegon, ke ĝi kapablis aranĝi ion tian senekzemplan. Ni deziras



kompletan sukceson kaj ĉiuj sabotaj klopodegoj fiaskiĝos.”

Wendel Pontes skribis en sia komento: “La malferma spektaklo de la Olimpiaj Ludoj ĉiam emocias nin. Vere, ni vidas la realan senton, ke ĉiuj landoj rolas sian propran identecon kaj samtempe ĉiuj havas la saman valoron. Nur tri eventoj povas kunigi diversajn popolojn kun la sama sento de egaleco en la monda panoramo, konservante siajn kulturon kaj identecon: Monda Pokalo, Olimpiaj Ludoj kaj









Kongresoj de Esperanto.”

Kazimiro Krzyżak el Pollando skribis: “Mi ege admiras ĉinan aranĝpovon pri organizo de la Olimpiaj Ludoj, 2008. Krome admirindaj ankaŭ estas ĉinaj sportistoj, kiuj mirigis la tutan mondon pri kvanto de akiritaj medaloj. Ĉinio pruvis al la tuta mondo, ke ĝi estas monda potenco, ne nur politika kaj ekonomia, sed ankaŭ sporta. Tutkore mi gratulas Ĉinan Nacion pro la imponaj sukcesoj kaj deziras al ĝi pluajn. Nunaj rezultoj konfirmas, ke mia fasciniĝo el Ĉinio kaj bazo de mia espero estas tute realaj kaj motivigitaj. Pro tio mi profunde kredas, ke sekva ŝanco por Ĉinio estos enkonduko de Esperanto je la mondo. Sendube la plej grandan meriton havas Redakcio de Ĉina Radio Internacia...”

Mirza skribis: “Uvertura ceremonio: Grandioza, senprecedenta evento, fascina enscenigo de plenplenaj ideoj kreivaj! Precizeco mirinda! Mi finfine iom teruriĝis pro la 'troa' perfekteco.”

Nilce el Brazilo opiniis: “Estis tre bela la komenco de la Pekinaj Olimpikoj! Gratulojn!”

Murata Kazujo el Japanio skribis en sia mesaĝo: “Ankaŭ mi spektis per televidilo la grandiozan admirindan malferman spektaklon de la Pekinaj Olimpikoj. Mi esperas, ke la Olimpikoj sukcese kaj sekure plenumu la tutan programon! ”

Fay Marcel el Francio diris: “Mi rigardis la malfermon de la olimpiaj ludoj, mi miris pri la beleco de la spektaklo antaŭ la televida ekrano. Mi gratulas ĉiujn partoprenantojn kaj ĉinojn. ”

Leopold Patek el Aŭstrio skribis: “Hodiaŭ mi spektis la tutan inaŭguron de la Pekinaj Olimpikoj, 2008, per Aŭstria Televido 1. Dum la lasta UK en Pekino mi vizitis la konstruaĵon por la Olimpikoj, sed nun mi certe ne plu rekonas la lokon.”

Koran dankon al ĉiuj gratulintoj kaj bondezirintoj!



# Pri la Pekinaj Paralimpikoj



Vespere de la 6-a de septembro solene inaŭguriĝis la Pekinaj Paralimpikoj, en kiu partoprenis delegacioj de 147 landoj kaj pli ol 4 000 sportistoj, la du nombroj ambaŭ superis tiujn de la antaŭaj paralimpikoj. Sume 44 000 volontuloj aktive servas en ĉiuj konkursejoj kaj aliaj ejoj, liverante oportunon kaj helpon. Estas la unua fojo en la historio, ke unu organiza komitato samtempe gastigas la olimpikojn kaj la paralimpikojn. Prezidanto de la Internacia Paralimpika Komitato Philip Craven esprimis en la inaŭguro, ke la Pekinaj Olimpikoj estas eksterordinare mirindaj, kaj li kredas, ke la Pekinaj Paralimpikoj certe sukcesos plene. La inaŭguro refoje vekis admiron de la mondo.

# Bonŝanco kaj defio

La Pekinaj Olimpikoj alportis al Ĉinio ŝancon de la ekonomia disvolvo kaj samtempe defion. Sekve kun veno de olimpika kulmino, pli kaj pli da homoj estas maltrankvilaj, ke post la olimpikoj ĉina ekonomio alfrontos mankon de disvolva movforto. Koncernaj fakuloj opiniis, ke ne ŝanĝiĝos baza movforto, kiu subtenas kontinuan kaj rapidan disvolvon de la ĉina ekonomio en la lastaj 30 jaroj, kaj ekonomia kaj investa kreskado, alportita de la olimpikoj, okupas malmultan proporcion en la ĉina ekonomia kaj investa totala kvanto, tial la olimpikoj ne ŝanĝos la tendencon de stabila kaj rapida evoluigo de ĉina ekonomio, sed daŭre ludos pli longan kaj kontinuan pozitivan rolon en altigo de ĉina nacia kvalito, plibonigo de media investo, altigo de malferma grado kaj levo de internacia figuro. Nun Ĉinio staras sur nova starpunkto kaj firmpaŝe antaŭenmarŝos al nova alteco!



# Mirakloj dum Pekinaj Olimpikoj

## Phelps kaj la ok oraj medaloj



En la konkurso de vira 4×100-metra miksnaĝado okazinta en la 17-a de aŭgusto, usona teamo gajnis oran medalon kaj rompis mondan rekordon. En la konkurso usona sportisto Phelps Michael gajnis la okan oran medalon kaj per tio faris miraklon rikolti ok orajn medalojn en unufojaj Olimpikoj. La boligita Akva Kubo kvazaŭ fariĝus scenejo sole por usona naĝisto Phelps.

## Nova stelino de ĉina sporta delegacio en naĝado



En la 14-a de aŭgusto, en finalo de virina 200-metra papili-stila naĝo, ĉina sportistino Liu Zige akiris oran medalon kaj rompis mondan rekordon. Tio estas la unua ora medalo de ĉina sporta delegacio en naĝado. Tiu ĉi 19-jara knabino per neatendita surprizo bruligis la Akvan Kubon!

## Jamaika flughomo dufoje rompis la mondajn rekordojn



Vespere de la 20-a de aŭgusto kadre de la olimpika atletika konkurso okazis finalo de la vira 200-metra kurado, en kiu jamaika sportisto Usain Bolt gajnis la oran medalon kaj rompis la mondan rekordon de 19,32 sekundoj per la rezulto de 19,30 sekundoj. Antaŭ kelkaj tagoj, en la finalo de la vira 100-metra kurado, li ĉampioniĝis per la rezulto de 9,69 sekundoj, kaj rompis la mondan rekordon, kreitan de li antaŭ kelkaj monatoj. Krome en la finaloj de virina 200-metra kurado kaj la virina 100-metra kurado, ankaŭ jamaikaj sportistinoj respektive akiris la oran medalon. Tial kelktempe Jamaiko fariĝis pronomo de mallongdistanca kurado.

Menciinde estas, ke post ĉampioniĝo, Usain Bolt donacis 50 000 usonajn dolarojn por helpi plagitojn de la ĉina tertrema regiono en la provinco Sichuan. Ni esprimas gratulon al jamaikaj sportistoj pro la brilaj sukcesoj en la Pekinaj Olimpikoj kaj koran dankon al Bolt pro lia bonkora monofero!

## Reĝino de salto per stango



La 18-an de aŭgusto, rusa sportistino Isinbayeva ĉampioniĝis en virina saltado per stango. Transsaltinte la 4,85-metran altecon, ŝi jam gajnis la oran medalon. Poste ŝi transsaltis alton de 4,95 metroj, rompinte la rekordon de 4,91 metroj, kreitan de ŝi en la Atenaj Olimpikoj kaj sekve sukcesis je la alteco de 5,05 metroj kaj 24-afoje renovigis la mondan rekordon. En la antaŭaj du provoj de transsalto de la du altecoj, ŝi malsukcesis, sed post kelkminuta meditado sub vatita kovrilo, ŝi sukcesis respektive en la du lastaj provoj.


## Kontraŭkancera heroo ĉampioniĝis



La 21-an de aŭgusto en vira 10-kilometra maratona naĝkonkurso, nederlanda sportisto Van Der Weijden Maarten gajnis oran medalon. Van Der Weijden Maarten suferis leŭkemion en 2001 kaj faris obstinan batalon kontraŭ kancero. Estas feliĉe, ke li revenis al konkursejo post sukcesa opecacio kaj ĉampioniĝis en la 10-kilometra naĝkonkurso. Li amas publikan bonstatigan aferon kaj faris multe da laboroj por kontraŭkanceraj organizoj.

## 38-jara ĉampionino de virina maratono

En la konkurso de virina maratona matĉo okazinta en la 17-a de aŭgusto, rumana sportistino Tomescu Constantina gajnis oran medalon. Ankaŭ tio vekis skuon en la mondo.



# Grava progreso de la ĉina spaciala tekniko














Vespere de la 25-a de septembro Ĉinio sukcese lanĉis la homportan spacoŝipon Shenzhou n. 7 en Jiuquan-a Satelitlanĉa Centro de Ĉinio. La spacoŝipo rotaciis laŭ la orbito alta je 343 kilometroj. Ĉi-foja flugado celas praktiki la unuan spacopromenon de ĉina kosmonaŭto, konkeri kaj posedi koncernan teknikon pri aktivado ekster la kajuto.

Vespere de la 27-a de septembro, Zhai Zhigang svingis nacian flagon de Ĉinio kaj komencis spacopromenadon. En la orbita kajuto, Liu Boming en la spacovesto por eksterŝipa aktivado subtenis kaj kunlaboris kun la eksterŝipa aktivado de Zhai Zhigang. Alia kosmonaŭto Jing Haipeng deĵoris en revena kajuto. Zhai Zhigang en la kombineo por eksterŝipa aktivado, farita de Ĉinio mem, faris spacopromenon dum ĉirkaŭ 20 minutoj kaj gajnis la koncernajn teknikojn pri eksterŝipa aktivado. Tio markis, ke nia Ĉinio fariĝis la tria lando, kiu sendepende posedas ŝlosilan teknikon pri eksterŝipa aktivado.

Je la 17-a horo kaj 37 minutoj de la 28-a de septembro, la revena kajuto de homporta kosmoŝipo Shenzhou n. 7 sekure surteriĝis en norda parto de Ĉinio.

Ĉinio faris homportan spacflugadon respektive en 2003 kaj 2005. Kompare kun la antaŭaj du flugoj, ĉi-foja flugado de la spacoŝipo Shenzhou n. 7 praktikis la unuan spacopromenon de la ĉina kosmonaŭto. En flugado unu kosmonaŭto agis ekster la kajuto portante la eksterkajutan kombineon esploritan kaj produktitan de Ĉinio mem kaj reprenis eksperimentan specimenan instalaĵon ekster la kajuto. Kosmonaŭto agis ekster kosmoŝipo, tio estas grava progreso de la ĉina spaciala tekniko.

# Renato Corsetti: Pekinaj Olimpikoj estas la plej grandiozaj dum la olimpika historio

La jaro 2008 estas signifoplena por ĉinoj. Speciale la sukcesa okazigado de la 29-aj Pekinaj Olimpikoj kaj la 13-aj Paralimpikoj altiris atenton de la tuta mondo. Post finiĝo de la Pekinaj Olimpikoj kaj antaŭ la okazigo de la Paralimpikoj, ni intervjuis s-ron Renato Corsetti, eksan prezidanton de UEA, veteranan esperantiston.



Mikrofone: Antaŭ nelonge okazis la Olimpiaj Ludoj en Pekino. Ĉu amaskomunikiloj de via lando multe raportis pri tio?

Renato Corsetti: Jes! Praktike, oni ne povis ne scii, ke okazas la Olimpiaj Ludoj en Pekino. La itala televido kaj ĉiuj televidstacioj, ĵurnaloj multe raportis ĝin. Mi jam diris, ke pri la komenca malfermo, oni montris la tutan malfermon. Oni ĉefe eble prefere montris la konkursojn en kiuj estis italaj sportistoj. Kaj multe atentis la italojn, kiuj gajnis medalojn. Tamen ĝenerale oni raportis pri ĉio.

Mikrofone: Italaj sportistoj akiris bonan atingon dum la Pekinaj Olimpikoj. Ili akiris medalojn en pafado, ŝosea biciklado, bokso, ĵudo kaj aliaj sportaj konkursoj.

Renato Corsetti: Fakte italoj ĝenerale estis kontentaj pri la rezultoj de la sportistoj italaj. Kaj ankoraŭ nun oni plufestas. Do, antaŭ kelkaj tagoj okazis la Itala Esperanto-Kongreso en iu urbo, Groseto. Tie estis granda festo, ĉar unu el la atletinoj, kiu gajnis la medalon pri velboatado, estas grosetanino.

Mikrofone: Laŭ via opinio, kio estas la ĉarmeco de olimpiaj ludoj?

Renato Corsetti: Efektive, olimpiaj ludoj fariĝis granda spektaklo kaj la tuta mondo sekvas ilin. Simple ne estas eble ne vidi ilin. Kaj aliflanke, tio estas ankaŭ bona, ĉar ĝuste ĝi estas tutmonda evento. Do, kiel okazis en la antikva Grekujo, ĝi estas ankaŭ afero tre grava, kiu devus indiki, ke oni povas superi naturajn apartaĵojn, ke oni volas pacon kaj tiel plu. Bedaŭrinde poste ne ĉiuj, almenaŭ ne ĉiuj registaroj, sekvas tiujn ideojn, ke olimpiaj ludoj estas montro de la unueco de la popoloj kaj devas esti periodo de paco sed ne de milito.

Mikrofone: Viaopinie, kiu diferenco ekzistas pri okazigo de la Olimpikoj en Pekino kaj en okcidentaj urboj?

Renato Corsetti: Jes, La Olimpiaj Ludoj en Pekino estis la plej grandaj, la plej grandiozaj, la plej imponaj en la tuta historio de olimpiaj ludoj. Mi rigardis la tutan malfermon kaj la fermon, neniam oni vidis ion tian en la antaŭaj Olimpiaj Ludoj. Sed la granda signifo de ĉi-fojaj Olimpiaj Ludoj estas ankaŭ, ke ili okazas en Ĉinujo. Ĉar vi scias, ke en la okcidento, ĉiuj rimarkas pli kaj pli, ke Ĉinujo fariĝis potenca lando, ĉiuj pli kaj pli trovas ĉinajn varojn en la vendejoj. Do la atento al Ĉinujo kiel al la estonta mondpotenco estas granda. Tio estas simpla fakto. Kelkaj timas tion. Ĉefe la landoj, kiuj sentas, ke la propra superrega pozicio estas minacata. Ĝuste tiuj landoj provis utiligi la Olimpiajn Ludojn por politikaj agadoj kontraŭ Ĉinujo. Sed tion la homoj komencas kompreni almenaŭ ankaŭ ĉi-tie. Mi volas diri, ke la tuta afero pri Tibeto estis inventita ĝuste en tiu ĉi momento, por esti ĝeno kontraŭ la ludoj en Ĉinujo, kaj kontraŭ Ĉinujo. Mi certas, ke oni jam forgesis la antikvan grekan ideon, ke olimpiaj ludoj estas momento de paco kaj de renkontiĝo inter homoj. Oni provis utiligi la ludojn por siaj politikaj celoj.

Mikrofone: Kio estas via plej profunda impreso rilate al la Pekinaj Olimpikoj?

Renato Corsetti: Mi mem ne havas profundajn impresojn, sed mi havas la profundajn impresojn de mia edzino, kiu apude instigis min rigardi kaj komentis pri tio, kion ni estis rigardantaj en la televido. Por ŝi la plej profunda impreso estas la grandeco de la ludoj kaj la kapablo de la ĉinoj fari

tion, kio estas io mirinda. Ŝi estis tre frapita de tio, ke ĉinoj sukcesis almenaŭ dum tiu periodo forigi la malbonan aeron, la polucion de Pekino mem, kiu estas tiom grandioza afero.

Mikrofone: Vi kelkfoje vizitis Ĉinion kaj Pekinon. Do, kiel vi opinias pri la aerokvalito de Pekino? Ĉu ĝi estas tiel serioza?

Renato Corsetti: Kiam mi estis en Pekino, mi ne aparte rimarkis ion. Simple nun la amaskomunikiloj daŭre diras pri la polucio en Pekino. Kiam mi estis tie mi ne rimarkis tion aparte kompare kun Romo aŭ Parizo aŭ okcidentaj urboj. Kaj cetere mia filo venos post kelkaj tagoj por resti dum du jaroj en Pekino. Li venos por studi la ĉinan kamparan evoluon en iu universitato en Pekino. Do, li ne venus se li timus, ke la aero estas tiel malbona.

Mikrofone: Laŭ vi, ĉu estas iom da simileco inter la Universala Kongreso de Esperanto kaj la Olimpiaj Ludoj?

Renato Corsetti: Jes! Ĉar ankaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino havis tiun saman karakteron de grandeco kaj bona organiziteco kaj atento fare de la instancoj kaj de la politikistoj de Pekino kaj tutlandaj, kion oni ĝenerale ne renkontas en okcidenteŭropaj landoj. Kiam UEA kongresis en Pekino, ĉeestis la prezidanto de la parlamento, la reprezentanto de Ministerio pri Eksteraj Aferoj, kaj multaj aliaj oficialuloj. Se oni kongresas en Roterdamo, eble venas iu sekretario de iu vicurbestro. Oni ne donas tiom da atento al Esperanto. Do, la kongreso iom similis la Olimpiajn Ludojn. Tio estas la “ĉina stilo”.

Mikrofone: Baldaŭ okazos la Paralimpikoj, ĉu vi ankaŭ ĝuos?

Renato Corsetti: Certe! Mi ankaŭ volontas rigardi ĝin en la televido. Ĝi estas tre interesa fenomeno, kaj ĝi estas de la lastaj tempoj doni la eblecon ankaŭ al la homoj, kiuj havas malavantaĝojn. Do, tio kongruas kun la ĝenerala evoluo de la socio, ke oni pli kaj pli atentas pri homoj kun problemoj. Do, mi esperas, ke ankaŭ ili estos sukcesaj. Kaj mi esperas, ke la Paralimpikoj, aŭ eble pli bone en Esperanto “Kromaj Olimpiaj Ludoj”, okazu en paco kaj trankvileco. Kaj multaj atletoj gajnos. Sed mi ne zorgas aparte pri tio, ĉu italoj aŭ usonanoj aŭ ĉinoj ricevos pli da medaloj, ĉar finfine la sporto devus esti sporto, en kiu oni ne tiom atentas pri la medaloj kaj la gajnoj. Kiel diris la fondinto de la modernaj olimpiaj ludoj Pierre De Coubertin, tio kio estas grava, estas partopreni ne gajni.

Mikrofone: Ĉe la fino de la intervjuo, kion vi volas diri al niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kaj la du Olimpikoj?

Renato Corsetti: Mi volas diri al ĉiuj aŭskultantoj de Ĉina Radio Internacia, ke ili plu aŭskultu la Esperanto-elsendon. Ĝi estas io tre grava, ĉar en pluraj landoj, ĉefe de Azio, multaj homoj lernas Esperanton aŭskultante Ĉinan Radion Internacian. Do, Ĉina Radio Internacia faras grandan servon ankaŭ al Esperanto, krom raporti pri la ĝustaj informoj pri Ĉinujo. Pri la du Olimpiaj Ludoj, mi volas sendi nur multajn, multajn bondezirojn.





# Tra la Mondo – 世界各地

## La konferenco de ILEI en Portonovo, Benino

De la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto, 2008, finfine okazis la konferenco de ILEI en Afriko, en la urbo Portonovo de Benino. Entute 42 partoprenantoj el pli ol 10 landoj ĝuis tiun konferencon.

Okazis multaj diskutoj pri la plibonigo de la situacio de Esperanto en Afriko.

Ĉiuj konferencanoj multe ĝojas pro tiu bela evento, kiu ebligis al ili koni la evoluon de Esperanto en Afriko kaj en diversaj landoj de Afriko.

*Kodjovi Francis AGBENOU*

## Trajno Zamenhof regule trafikas en Pollando

Danke al la afabla helpo de la Direkcio de la Regiona Trajna Kompanio en Bjalistoko, laŭ la propono de la urbestro de Bjalistoko Tadeo Truskolaski, kun la financa subteno de Marŝalo de la Podlahia Vojevodio en la somera fervoja horaro 2008 ekestis la trajno Zamenhof.

La 1-an de junio 2008 ĝi startis la unuan fojon sian longan veturadon de Bjalistoko al Bielsko-Biała. Sur la kajo en la fervoja stacio de Bjalistoko, je la 6-a horo okazis solena 'bapto' de la trajno. La bjalistoka urbestro Tadeusz Truskolaski salutis ĉiujn venintajn gastojn kaj solene ŝanĝis tabuleton de la trajno“Bjalistoko – Bielsko-Biała” kaj post signalblovo fare de la fervoja fajfilo la trajno forvojaĝis.

*Jindřich Tomíšek el Ĉeĥio*

## Invito al la 34-a Kataluna Kongreso de Esperanto

Kataluna Esperanto-Asocio invitas al la 34-a Kataluna Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Sabadell, Hispanio, la 6-an, la 7-an kaj 8-an de decembro, 2008.

La Katalunaj Kongresoj de Esperanto kunigas altnivelajn prelegojn kaj riĉan artan programon kun unuarangaj gastoj el diversaj mondopartoj.




Ĉi-jare la kongresa prelegaro ĉefe turnos ĉirkaŭ la temo "Esperanto kaj tutmondiĝo: Perspektivoj por la estonto". La kongreso celas aparte atenti pri la celoj de esperantismo en mondo pliimplikiĝanta ekonomie, kulture, lingve, ideologie kaj loĝe, tamen atentos ankaŭ aliajn temojn por doni pli grandan diversecon al la prelegoj.

Krome, okaze de la Internacia Jaro de Lingvoj antaŭ la kongreso okazos serio da prelegoj kaj rondaj tabloj pri lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj lingvoj kaj paco fare de reprezentantoj de elstaraj katalunaj organizoj.

*Ferriol Bonet Kataluna Esperanto-Asocio*

## Mikronovelo – 微型小说



# Baniĝo

Revenante hejmen post laboro en oficejo, Maljuna He faras plumbajn paŝojn, meze de homoj, kiuj sin interpremas. Antaŭ liaj okuloj oscilas sennombraj vizaĝoj, tre lacaj kaj senmienaj. Li ekpensas vidinte tiajn vizaĝojn, "Certe ankaŭ mia vizaĝo estas tia, kiel aliaj vidas!" Kaj li eksentas sin kompatinda en la laciga vivo. Jen ruĝa lumo! Kaj ĉies piedoj haltas. Jen verda lumo, kaj ĉiuj rehastas antaŭen. Halto kaj iro, iro kaj halto, kiujn ĉiutage ĉiuj laborantaj en la urbo devas fari. "La devo ja signifas ian senpovecon," li denove pensas, tre patose, eĉ filozofie.

Maljuna He sin turnas en malnovan kaj kvietan straton, por eskapi el la bruoj kaj kaoso kaj fari paŝadon pli facile kaj pli liber e. Li preterpasas malnovan korton kies pordo estas plena de hederoj. Subite li aŭdas pianajn sonojn. Oni ludas la pianon tre lerte, eĉ majstre. La melodio estas ege agrabla, dolĉa kaj ebriiga. Liaj piedoj ne moviĝas plu, ĉar la piana muzikaĵo sendas lin en printempon, sur kampon, inter verdajn arbojn sur monto, al klara rojo, super kiu birdetoj gaje pepas. Maljuna He vidas ĉarmon de la vivo kaj naturo kaj sentas fortan poeziecon.

De tiam, ĉiutage, Maljuna He nepre venas al la kvieta kaj malnova strato kaj haltas antaŭ la hederplena, malnovtipa korto, por ke la pianaj sonoj akve trafluu lian polvan korkampon.

Iun tagon, la edzino-kamarado de Maljuna He venis en tiun straton hazarde. En malproksimo ŝi vidis, ke iu, stulte staranta ie, ŝajnas ŝia edzo. Ŝi rapide alkuris, Jen, ĝuste la ulaĉo! Kion li faras? Ĉu iun inon li atendas?

"Hej! Jen kial en ĉiu tago vi tiom malfrue revenas al la hejmo! Jen, jen! Ci, stultulo! Ci staraĉas ĉi tie! Por kio? Por iun ineton atendi? Rapide hejmen! Alie vi ne havos la vespermanĝon!"

"Ne ĝenu!"

"Kio?"

"Baldaŭ!"

"Baldaŭ tiu inaĉo elvenos? Bone! Mi rigardu, kia ŝi estas!" Kaj ankaŭ ŝi staris tie. Dume ŝi aŭdis pianajn frapojn, kiuj apenaŭ ŝin impresis kaj pro tio, ke ŝi tute ne interesiĝis pri la muziko, kaj ankaŭ pro tio, ke ĉi-momente ŝia atento estis koncentrata al iu "inaĉo" kiu, laŭ ŝia imago, estis nepre aperonta antaŭ ŝi.

Ekiris ŝia edzo, ĝuste kiam oni ĉesis marteli la pianon. Tiam ŝi atingis la konkludon, ke li neniun atendas; tamen ŝi neniom komprenis, kial li staraĉas tie. Ŝi rapidigis la paŝojn kaj baldaŭ atingis lin. "Kion vi faris tie?"

"Baniĝon!" La sola vorto saltis de sur lia lango.

Gapis la edzino.

**Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia**

| UTC | Regionoj | Ondoj | kHz |
|---|---|---|---|
| 11:00-12:00 | Japanio, Koreio | 294,99 | 1017 |
| 13:00-14:00 | Sudorienta Azio | 25,75 31,78 | 11650 9440 |
| 19:30-20:30 | Eŭropo | 30,79 41,29 | 9745 7265 |
| 22:00-23:00 | Latin-Ameriko | 30,43 25,64 | 9860 11700 |
| 18:00-19:00 | Albanio kaj periferiaj landoj | | 1215 |

**Konstanta adreso:** Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040
**Tel:** +86(10)68891940 **Fax:** +86(10)68891164
**Retadreso:** espradio@cri.com.cn **Retpaĝo:** http://esperanto.cri.cn

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Beijing 2008

CRI
CHINA RADIO INTERNATIONAL
中 国 国 际 广 播 电 台

北京2008年奥运会持权转播商
RIGHTS HOLDING BROADCASTER OF THE BEIJING 2008 OLYMPIC GAMES

CRI online
Esperanto

http://esperanto.cri.cn

（2008年第三期 总第23期）

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn
Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040